

E G U - Esperanto - Gruppe Unterweser e. V.

Esperanto Gazeto

N-ro 22

ISSN 1861-3330

Jun. – Sep. 2008

EGU-Info: <http://www.esperanto.de/unterweser>



Nordenham, 08.05.2008: Die Saat ging auf: Die von unserem Verein gepflanzten Tulpen der Sorte Esperanto blühen im Museumspark.

Nordenham, 8-a de Majo 2008: La semitaĵo elkreskis: La de nia klubo plantitaj tulipoj de la specio Esperanto floras en la muzeoparko.

Emma senbalailigis nian balail-ĵetadon (Nordenham, 1-a de Marto 2008)

La ciklono *Emma* malokazigis nian balail-ĵetadon: La vojo estis inundita, same unu el la enirejoj de la restoracio por nia komuna vespermanĝo kun dancado. Ĉi tio okazis malgraŭ ĉio. Estis bongusta krispbrasiko, kaj la honordancon faris Dörte kaj Günther, niaj novaj brasikreĝaj moŝtoj. Nia grupo festis kune kun du aliaj brasik-societoj. Niaj Esperanto-trikotoj kaŭzis ĉe iuj la scivolon pri Esperanto. Ni utiligis la ŝancon por informi pri ĝi. Multan dankon al la festkomitato por la amuza vespero. – Andreas



Emma machte unser Besenwerfen besenlos (Nordenham, 01.03.2008)

Das Tief *Emma* ließ unser Besenwerfen platzen: Die Strecke war überschwemmt, ebenso einer der Eingänge des Restaurants für unser gemeinsames Abendessen mit Tanz. Das fand trotz alledem statt. Es gab leckeren Grünkohl, und den Ehrentanz machten Dörte und Günther, unsere neuen kohlköniglichen Majestäten. Unsere Gruppe feierte zusammen mit zwei anderen Kohlgesellschaften. Unsere Esperanto-Trikots weckten bei manchen die Neugier auf Esperanto. Wir nutzten die Chance, darüber zu informieren. Vielen Dank an den Festausschuss für den amüsanten Abend. – Andreas


Ehrentanz/Honordanco

Pri la libro “Oficialaj lingvoelementoj de Esperanto (OLEO)”

Sekvas citaĵo de la resumo de tiu ĉi de Andreas verkita kaj mem eldonita libro: *“Tiu chi libro donas superrigardon pri la oficialaj lingvoelementoj de Esperanto. Oficialigoj bazighas sur instrukcio donita en la Antaŭparolo al la Fundamento kaj okazis plurfoje ekde 1909 ghis 2007. La oficialigaj dokumentoj ne montras unuecan aspekton. Kaj ankau la prezento de la oficialaj lingvoelementoj varias: Parte la lingvoelementoj prezentighas kun finajhoj, parte sen tiuj chi; parte estas donitaj tradukoj, parte estas donitaj nur au aldone Esperantlingvaj difinoj. Alia fenomeno estas, ke per la unuaj tri oficialaj aldonoj estis oficialigitaj ankau pluraj tiaj vortoj, kiuj aperas jam en la Fundamento au Antaŭparolo al ghi. En tiu chi libro estas kompilitaj la oficialaj lingvoelementoj de la unua ghis sepa aldonoj al la Universala Vortaro kun en tiuj chi eventuale donitaj tradukoj en nacilingvojn (escepte de tiuj en la rusan) kaj Esperantlingvaj difinoj. Plue estas donitaj la titoloj de oficialigaj dokumentoj kaj bibliotekoj, en kiuj oni povas trovi tiujn dokumentojn. Estas preskau kvin mil lingvoelementoj, kiuj estas Fundamentaj au oficialaj.”* La 54-a paĝa libro (ISBN 978-3-00-023800-0) ne estas aĉetebla, sed ĝi estas disponebligita al la publiko en la Esperanto-bibliotekoj de Aalen, Herzberg – la Esperanto-urbo, Vieno kaj Roterdamo. Pri la redono de la libroenhavo en elektronika formo: <http://www.akueck.de/oleo.htm>. – Andreas

Maja ekskurso 2008 (Elsfleth, 24-a de Majo 2008)

En bonega, suna vetero 22 esperantistoj el nia klubo kaj tiu de Bremeno ekskursis al Elsfleth. Iama instruisto de la tiea *Seefahrtsschule* (marvetur-lernejo) klarigis multajn interesajn aferojn pri tiu branĉo de la fak-altlernejo Oldenburg/Ostfriesland/Wilhelmshaven kaj pri la evoluo de la markomercio: Tiu ĉi utiligas modernajn kontenerojn kaj estas la motoro de la nuna tutmondiĝo. Tio ĉi speguliĝas en la nuna aspekto de havenoj, malkreskinta nombro de havenlaboristoj kaj kreskanta nombro de studentoj: Dum en la 80-aj jaroj de la pasinta jarcento la lernejo estis fermota pro tro malmulte da studentoj, ĝi nun apenaŭ povas akcepti ĉiujn interesiĝantojn. La ŝiptrafiklingvo estas la angla, sed per ĝi ne estas plenumataj ĉiuj komunikbezonoj. Tiuj, kiuj scipovas ekz. orient-Eŭropan lingvon aŭ la ĉinan, havas avantaĝojn. Imponaj estis la planetario kaj la elvido de sur la turo. La sukcesa ekskurso finiĝis per kafumado en la restoracio *Zur Kogge*. Multan dankon precipe al Dörte, kiu estis mendinta tiel belan veteron. – Andreas



*Auf dem Turm der
Seefahrtsschule / Sur la turo de
la Seefahrtsschule*

Mai-Ausflug 2008 (Elsfleth, 24.05.2008)

Bei herrlichem, sonnigem Wetter machten 22 Esperantisten aus unserem Verein und dem von Bremen einen Ausflug nach Elsfleth. Ein ehemaliger Lehrer der dortigen Seefahrtsschule erläuterte viele interessante Dinge über diesen Zweig der Fachhochschule Oldenburg/Ostfriesland/Wilhelmshaven und über die Entwicklung des Seehandels. Dieser nutzt moderne Container und ist der Motor der jetzigen Globalisierung. Das spiegelt sich wider im jetzigen Aussehen von Häfen, einer verringerten Zahl von Hafenarbeitern und zunehmenden Zahl von Studenten: Während in den 80er Jahren des letzten Jahrhunderts die Schule wegen zu wenigen Studenten vor einer Schließung stand, kann sie jetzt kaum alle Interessenten aufnehmen. Die Schiffsverkehrssprache ist Englisch, aber damit werden nicht alle Kommunikationsbedürfnisse erfüllt. Diejenigen, die z. B. eine osteuropäische Sprache oder Chinesisch können, haben Vorteile. Eindrucksvoll waren das Planetarium und die Aussicht vom Turm. Der gelungene Ausflug endete mit einem Kaffeetrinken im Restaurant *Zur Kogge*. Vielen Dank vor allem an Dörte, die so schönes Wetter bestellt hatte. – Andreas

85-a Germana Esperanto-Kongreso 2008 (Asindo [Essen], 9-a ĝis 12-a de Majo 2008)

Andreas povis partopreni nur en la vendredo kaj sabato kaj resumas: "Tio estis tre informriĉa kaj amuza kongreso: La prelegoj pri antaŭjuĝoj, pri la rilato inter GEA kaj UEA kaj pri Tanzanio estis tre bonaj. Mi trovis interesajn librojn, kaj

nia klubo estis provizita per plaĉaj, tute novaj Esperanto-informbroŝuroj. La



Kongressteilnehmer aus unserem Verein I Kongresanoj el nia klubo

koncerto de *La Kuracistoj* kaj la dancado kun bambumado (grupdanco kun kisoj!) estis grandiozaj. Suna urbo, simpatiaj homoj, bonega etoso: volonte denove.” – La ok samklubanoj de Andreas ekskursis. Anne kaj Thomas: “Kune kun dek ses aliaj partoprenantoj ni veturis per tri taksioj al Duisburg. Unue ni promenis en parto de Duisburg ĉirkaŭ la *Salvator*-preĝejo kaj la urbdomo, kaj Anne el Duisburg klarigis al ni la gravajn konstruaĵojn. Bedaŭrinde la preĝejo kaj urbdomo estis fermitaj. Poste ni veturis per malgranda ekskursŝipo tra la haveno

de Duisburg. Feliĉe por nia grupo estis rezervitaj lokoj, ĉar tiel ni povis kunveturi. (Pro velŝipkonkurso la pli granda ŝipo malfruiĝis je duona horo; per tiu ŝipo povis kunveturi la aliaj multaj turistoj.) La haveno estas la plej granda internlanda haveno de la mondo. Per sia trafikfavora situo ĉe la riveroj Ruhr kaj Rejno Duisburg fariĝis agema komercejo jam dum la frua mezepoko. Alvenas precipe minaĵoj, mineralaj oleoj, metalrubaĵoj, greno kaj nutraĵoj. Estas forŝipigataj precipe karbo, fero kaj ŝtalo, maŝinoj, rafinitaĵoj kaj industriproduktoj ĉiuspecaj. La haveno aspektas tre impona. La rondveturo tra la haveno estis belega travivaĵo, ne nur pro la suna vetero, sed ankaŭ pro la interesaj klarigoj de la ŝipestro.” – Pri la prelegoj Anne diras: “Mi aŭskultis tri interesajn prelegojn, nome 'Aŭtoraj rajtoj internacie' (D-ro Petro Chrdle), 'Pri tradukado de la Biblio' (Gerrit Berveling) kaj la ĉefprelegon 'Dank' al Esperanto, miaj antaŭjuĝoj nun havas fundamenton el propraj spertoj' (Gregor Hinker, prezidanto de TEJO). Por mi estis novaĵo, ke tiom da antaŭjuĝoj ekzistas.” – Alke, Anke, Günther, Hermann, Renate kaj Udo-Eugen ekskursis al la minejo *Zeche Zollverein*: “La grupo veturis per tramo. Ĉe la akceptejo bonvenigis nin gvidisto. Komence li donis al ni kelkajn informojn pri la minejo. Poste li gvidis nin supren sur la turon. Ni devis supreniri multajn ŝtuparojn kun po multaj ŝtupoj. Supre ni havis bonegan elvidon al Essen, Gelsenkirchen kaj Bochum. Poste la minejgvidisto komentis la fazojn de la karblavado, dum la grupo malsupreniris etaĝon post etaĝo. Fine li montris al ni diversajn laborilojn el la minej-historio. La ekskurso estis tre interesa. Antaŭ la reveturo al la hotelo la grupo trinkis kafon en la minejkafejo.” – Alke, Andreas, Anke, Anne, Günther, Hermann, Renate, Thomas, Udo-Eugen

85. Deutscher Esperanto-Kongress 2008 (Essen, 09.-12.05.2008)

Andreas konnte nur am Freitag und Sonnabend teilnehmen und fasst zusammen: „Das war ein sehr informativer und unterhaltsamer Kongress: Die

Vorträge über Vorurteile, über die Beziehung zwischen dem Deutschen Esperanto-Bund und Esperanto-Weltbund und über Tansania waren sehr gut.

Ich fand interessante Bücher, und unser Verein wurde mit ansprechenden, ganz neuen Esperanto-Informationsbroschüren ausgestattet. Das Konzert von *La Kuracistoj* und das Tanzen mit einem *bambumado* (Gruppentanz mit Küssen!) waren großartig. Sonnige Stadt, sympathische Leute, tolle Stimmung: gerne wieder." – Andreas' acht Vereinskameraden machten Ausflüge.



Kleine Gruppe, Riesenspaß: bambumado / Malgranda grupo, plezurego: bambumado
– Foto: R. Schindler

Anne und Thomas: „Zusammen mit sechzehn anderen Teilnehmern fuhren wir mit drei Taxis nach Duisburg. Zunächst spazierten wir in einem Teil Duisburgs um

die *Salvator*-Kirche und das Rathaus herum, und Anne aus Duisburg erklärte uns die wichtigen Bauwerke. Leider waren die Kirche und das Rathaus geschlossen. Dann fuhren wir mit einem kleinen Ausflugsschiff durch den Duisburger Hafen. Glücklicherweise waren für unsere Gruppe Plätze reserviert, denn so konnten wir mitfahren. (Wegen einer Segelregatta verspätete sich das größere Schiff um eine halbe Stunde; mit dem Schiff konnten die anderen vielen Touristen mitfahren.) Der Hafen ist der größte Binnenhafen der Welt. Wegen seiner verkehrsgünstigen Lage an den Flüssen Ruhr und Rhein wurde Duisburg schon während des frühen Mittelalters ein agiler Handelsplatz. Es

kommen vor allem Erze, Mineralöle, Schrott, Getreide und Nahrungsmittel an. Verschifft werden vor allem Kohle, Eisen und Stahl, Maschinen, Raffinerie- und Industrieprodukte aller Art. Der Hafen sieht sehr imposant aus. Die Rundfahrt durch den Hafen war nicht nur wegen des sonnigen Wetters ein tolles Erlebnis, sondern auch wegen der interessanten Erläuterungen des Kapitäns." – Zu den Vorträgen sagt Anne: „Ich hörte drei interessante Vorträge, nämlich 'Urheberrechte international' (Dr. Petro Chrdele), 'Über das Übersetzen der Bibel' (Gerrit Berveling) und den Hauptvortrag 'Dank Esperanto haben meine Vorurteile jetzt eine Grundlage aus eigenen Erfahrungen' (Gregor Hinker, Präsident der Esperanto-Welt-Jugendorganisation). Für mich war es etwas Neues, dass so viele Vorurteile existieren." – Alke, Anke, Günther, Hermann, Renate und Udo-Eugen machten ei-



La Kuracistoj

nen Ausflug zum Bergwerk *Zeche Zollverein*: „Die Gruppe fuhr mit der Straßenbahn zum Bergwerk. Am Empfang hieß uns ein Führer willkommen. Zu Beginn gab er uns einige Informationen über das Bergwerk. Dann führte er uns auf den Turm. Wir mussten viele Treppen mit je vielen Stufen steigen. Oben hatten wir einen herrlichen Ausblick auf Essen, Gelsenkirchen und Bochum. Dann kommentierte der Bergwerksführer die Phasen des Kohlewaschens, während die Gruppe Stockwerk für Stockwerk hinabstieg. Schließlich zeigte er uns verschiedene Arbeitsmittel aus der Bergwerksgeschichte. Der Ausflug war sehr interessant. Vor der Rückfahrt zum Hotel trank die Gruppe Kaffee im Bergwerkscafé.“ – Alke, Andreas, Anke, Anne, Günther, Hermann, Renate, Thomas, Udo-Eugen

Printempa Berlina Arbara Renkontiĝo (Printempa BARo) (Bad Münster, 15-a ĝis 18-a de Majo 2008)

Andreas havis farotaĵon en tiu regiono kaj kaptis la oportunon por pasigi kelkajn horojn ĉe tiu ĉi aranĝo. Ĉirkaŭ 20 homoj, ĉefe el Germanujo, sed ankaŭ kelkaj el



Charakteristisch für das Berliner Heim: hölzerne Nur-Dach-Häuser!
Karakterizaj por Berliner Heim: lignaj nur-tegment-domoj

Hungarujo kaj Rusujo, renkontiĝis en *Berliner Heim* en arbaro proksimume 35 km sudokcidente de Hanovro. Pro kio estas tiu “peco de Berlino” en Malsupra Saksujo? Nu, estis Okcident-Berlinanoj, kiuj antaŭ multaj jaroj akiris tiun feriestablaĵon. La motivo estis ebligi al Okcident-Berlinaj infanoj pasigi tempon en arbaro kaj ekkoni ĝin. Oni memoru, ke siatempe Okcident-Berlino estis ĉirkaŭata de GDR. Iam ankaŭ esperantistoj komencis utiligi tiun ejon (intertempe regule po du fojoj jare), por malstreĉiĝi, promeni, ludi, komune kuiri kaj – danke al (aŭ ĉu bedaŭrinde pro?) la nunaj teknikaj eblaĵoj – retumi. – Andreas

Berliner Wald-Frühlingstreffen („Printempa BARo“) (Bad Münster, 15.-18.05.2008)

Andreas hatte in der Gegend etwas zu erledigen und nutzte die Gelegenheit, um ein paar Stunden bei dieser Veranstaltung zu verbringen. Etwa 20 Leute, hauptsächlich aus Deutschland, aber auch einige aus Ungarn und Russland, trafen sich im *Berliner Heim* in einem Wald etwa 35 km südwestlich von Hannover. Wie kommt es zu diesem „Stück Berlin“ in Niedersachsen? Nun, es waren West-Berliner, die vor vielen Jahren die Ferienanlage erwarben. Der Grund war, West-Berliner Kindern zu ermöglichen, Zeit im Wald zu verbringen und ihn kennenzulernen. Man erinnere sich, dass West-Berlin seinerzeit von der DDR umgeben war. Irgendwann begannen auch Esperantisten, den Ort zu nutzen (mittlerweile regelmäßig zweimal im Jahr), um auszuspannen, spazierenzugehen, zu spielen, gemeinsam zu kochen und – dank (oder leider wegen?) der jetzigen technischen Möglichkeiten – im weltweiten Rechnernetz zu stöbern. – Andreas

Enigma

	1	2	3	4	5	6
				7		
1			9			
2				10		
3				11		14
4					8	
5			12			
6				13		

Ĝuste ordigite, la literoj en la grizaj ĉeloj rezultigas la nomon de Olimpika urbo.

Juli

Klingt im Wind ein Wiegenlied,
Sonne warm herniedersieht,
seine Ähren senkt das Korn,
rote Beere schwillt am Dorn,
schwer von Segen ist die Flur –
junge Frau, was sinnst du nur?

Theodor Storm

Juli'

Sonas en la vent' lulkant' charme,
suben rigardas la sun' varme,
siajn spikojn klinas la gren',
peza estas la kamp' je ben',
jen rugha bero, sur la domo shvelas ghi –
juna virin', pri kio do meditas vi?

El la germana esperantigis Andreas

*En unu tago en
Julio 2006 en
Rodenkirchen / An
einem Tag im Juli 2006
in Rodenkirchen*



Ŝercaĵo

Diras skeleto al alia: “Ek, ni iru al la plaĝo!” – “Pli bone ne”, respondas la alia, “tie ni ridindigos nin ĝisoste!”

Veranstaltungshinweise

Unsere **Esperanto-Lernrunden** für: a) Anfänger mit Vorkenntnissen (Stufe A2¹⁾): Do. 19:00-20:30 Uhr, Gemeindehaus der kath. Kirchengemeinde St. Willehad, St.-Willehad-Str. 37, 26954 Nordenham; b) Fortgeschrittene (Stufen B1, B2, C1¹⁾): Do. 19:45-21:15 Uhr, Ev.-luth. Kirchengemeinde Brake, Kirchenstr. 24, 26919 Brake. – Unsere **monatlichen Vereinstreffen** sind vorgesehen für den **19.06.2008**, 19:30 Uhr in der Gaststätte *Friesenheim*, Friesenstr. 15, 26935 Rodenkirchen; den **14.08.2008**, 19:30 Uhr in der Gaststätte *Müggengrug*, Elsflether Str. 52, 26125 Oldenburg. Aktuelles u. Einzelheiten können unserer Netzseite <http://www.esperanto.de/unterweser/aranghoj.htm> entnommen oder bei Anne Höpken, Tel.: 04731-4837, erfragt werden. Gäste sind willkommen. Außerdem:

19.-26.07.2008	93. Esperanto-Weltkongress, Rotterdam, Niederlande
04.-07.09.2008	Aŭtuna BARo 2008, Bad Münde
19.-21.09.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ²⁾
31.10.-02.11.2008	Esperanto-Sprachkurse, ICH ²⁾
22.11.2008	EMAS ³⁾ -Kulturtag, Bremen

¹⁾Erläuterung d. Stufen: http://www.europass.cedefop.europa.eu/img/dynamic/c1349/type.FileContent.file/ELPEexamples_de_DE.pdf, S. 2; auf Esp.: <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#691>

²⁾ICH: Interkultura Centro Herzberg, Grubenhagenstr. 6, 37412 Herzberg, Tel.: 05521-5983

³⁾EMAS: Esperanto-Ligo de Malsupra Saksio (Landesverb. Niedersachsen im Dt. Esp.-Bund e. V.)

Impressum:

Zeitschrift:

Erscheinungsweise:

Herausgeber:

Information und Redaktion:

Bankverbindung

(für Beiträge und Spenden):

Esperanto Gazeto (ISSN 1861-3330)

dreimal jährlich als Druckausgabe und elektronische Ausgabe, Netzseite:

<http://www.esperanto.de/unterweser/gazeto.htm>

Esperanto-Gruppe Unterweser e. V.

(<http://www.esperanto.de/unterweser>)

Anne Höpken, Magdalenenstr. 27,

26954 Nordenham, Tel.: 04731-4837

Dörte Bierkämper, Tel.: 04404-3368

Andreas Kück, Tel.: 04702-5044

Mario Müller, Tel.: 04732-1373

Raiffeisenbank Oldenburg eG

BLZ 28060228

Kontonummer 1200160000

(Kassenwartin: Dörte Bierkämper)